

# Dudek tagoj en Rodope-montaro

Kion dirus ĝenerala „saĝa menso” pri lingvokurso de Esperanto, kiu daŭras dudek somerajn tagojn? Frenezaĵo, ĉu ne, kaj pro la tempoperdo (preskaŭ tri semajnoj da ferioj, for de la familio, dediĉita tamen ne al ripozo), kaj pro la elspezoj (vojaĝo, loĝado, manĝoj). Malgraŭ tio, preskaŭ ducent plenkreskuloj (junaj kaj malpli junaj) ĝuis ĉi-jare tian kurson en julio kaj aŭgusto en la Internacia Esperanto-Kursejo de Pisanica, Bulgario.

La Kursejo troviĝas en Rodope-montaro. Ĝi estas ĉirkaŭata de mirinde bela naturo: verdaj montdeklivoj kaj rokaj pintoj, silento, pura kaj fojn-aroma aero — tre agrablaj kondiĉoj por soleca promenado aŭ grupa pikniko. La facile atingebla apuda urbo, Smoljan krom la belega kunfando de naturo kaj arkitekto kontentigas eĉ pretendemajn dezirojn: muzeoj (speciale por hungaroj: muzeo honore al la poeto NAGY László), teatro, planetario (kun Esperantlingva programo), naĝejo, diversspecaj magazenoj, kafejoj ktp.

La konstruaĵo de la Kursejo estas hotelo kun restoracio, kiasĉambroj, modesta biblioteko — kaj diskoteko.

La kursanoj plejnombro venas el diversaj partoj de Bulgario. Inter la 120 personoj en aŭgusto troviĝis kelkaj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Jugoslavio, el diversaj sovetiaj respublikoj (Litovio, Ukraino ktp.); aperis gastoj el Hungario, Nederlando, Pollando — do ne plene internacia publiko, sed tiu kiu volis, certe sukcesis formi internacian kontakton kaj etoson.

La instruado okazis je kvar lingvaj niveloj, la kvara jam samtempe faka (instruista kaj tradukarta). La programo enhavis 68 studhorojn, t.e. po 4-5 tage. Ĉe la fino de la kurso estis proponita ekzameno de BEA, kies trapason la kurso helpis. (Ĝi ne estis simpla kurs-fina ekzameno!)

Ne nur la kursanoj, sed ankaŭ la instruistaro alvenis el diversaj urboj de Bulgario. Estis tre agrable vidi la amikan kunlaboron de la gekolegoj, kaj estas vera honoriga sento spertiĝi en tia medio.

Ĉu vi ne emus perdi la „saĝan menson” kaj freneze ĝui dudek tagojn?!

KOVÁCS Márta

---

## La 10. doktoro de lingvistiko

D-ro Balázs Szemők la 13an de novembro defendis sian doktorigan disertacion „Evoluo de la hungara stomatologia lingvo kaj la evoluigo de Esperanto”. D-ro Szemők — cetere fama en la E-movado de stomatologoj — estas en Hungario la 10a kandidato, kiu fariĝis lingvistika doktoro prilaborante Esperanto-temon en la Budapeŝta Sciencuniversitato Loránd Eötvös.